

1.22.1914

AMERIKA ESPERANTISTO



JANUARY, 1914



Botoj, Ŝuoj, Sandaloj, Pantofloj,
Kaŭcukaj Ŝuoj, Strumpoj. Ĉiuj
eksklusive laŭ la tipo
'Naturformo.'

HOLDEN FRATOJ,

3, Harewood Place,
Oxford St., London, W.

Katalogoj Senpage.

If you have the great desire to write--the usual sign of inborn literary talent—careful study of the twice-monthly numbers of THE EDITOR will enable you to produce and sell manuscripts. Each number contains inspiring and informative articles by editors and writers on important phases of literary craftsmanship. Vital questions are answered in the "Questions and Answers" Department. Each number contains, in "The Literary Market" Department, news of opportunities to sell all kinds of literary material.

Twice-monthly

\$1.50 a year \$10 a copy

THE EDITOR, Box E, Ridgewood, N. J.



LINOTYPE COMPOSITION
A SPECIALTY



PRINTING?

WE DO IT

UP-TO-THE-MINUTE EQUIPMENT

PROMPT SERVICE

CAREFUL WORKMANSHIP

ARE YOU "FROM MISSOURI"?

LET US SHOW YOU

The American Esperantist Co., Inc.

West Newton, Mass.

LA MOVADO

L'ESPÉRANTISTE FRANÇAIS
Oficiala Organo

de la Societo Franca por la propagando de Esperanto

Publikigas informojn pri la organizado de la Xa Universala Kongreso de Esperanto en Parizo, 1914, la Pariza vivado kaj aliaj plej interesaj aferoj.

Ciuj gesamideanoj, precipie la estontaj gekongresanoj, devas do legi ĝin.

Jara abono Francujo; Fr. 2, 50

Alilando: Fr. 3, 25—Sm. 1,300

41 Blvd St. Marcel, Paris, Francujo

Sendo de la lasta numero kontraŭ unu internacia respondekupono.

DEZIRAS KORESPONDI

[Unufoja anono kostas 20c. (40 Sd.) por ĉiu linio. Kvarfoja anono kostas 50c. (1 Sm.) por ĉiu linio. Linio enhavas proksimume 40 literojn, punktojn aŭ spacojn.]

Multaj instruistoj kaj gestudentoj volas korespondi kun ge-samideanoj en Usono kaj fremdaj landoj. Adresu: S-ro P. M. Schuyler. Esto de Lernejoj, Pickford, Mich., Usono.

S-ro Pimenov, Moriinskoje pošt. otd. Tersk. obl., stanica Staropavlovskaja, Rusujo. I. P. K., kaj fotografaĵoj. Ĉiam respondos.

S-ro Sidney Lee, Box 292, Jennings, La., Usono.

BOOKS! MAGAZINES!

We take this occasion to announce that all Magazine Subscriptions or Orders for Books of any nature published in U. S. may be sent to us, and will command the most prompt and careful attention

Magazine Subscriptions received at Publisher's Prices

CLUB RATES QUOTED upon application

Help make this addition to our business a success. Send in your renewals or new subscriptions to your favorite periodicals TODAY

Our new magazine catalogue sent free on request

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.
West Newton, Mass.

TO NON-EPERANTISTS:

Ask your enthusiastic Esperantist friends for a small English grammar of the language. Every real Esperantist carries a number of this handy little propagandilo.

25 Keys for only 25 cents. 100 for only One Dollar.

The American Esperantist Co., Inc.
West Newton, Mass.

LA ONDO DE ESPERANTO

MONATA ILUSTRATA REVUO

(fondita en la jaro 1909).

Ciu jarabonanto ricevos *senpage* la libron:

"ORIENTA ALMANAKO"

el la lingvoj japana, hina, araba, hindia, sanskrita, persa, armena, kartvela k. t. p. k. t. p.

"La Ondo" aperas akurate la 1-an datan, novstile. Ciu n-ro havas 16—24 pag.
Formato 17x26. Bela kovrilo.

(Pošt. ilustr.)

Sendu abonpagon (\$1.10) alla American Esperantist Co., West Newton, Mass.

SI VIDIS

Policano—Cu vi vidis la numeron de la aŭtomobilo kiu vin bat-faligis, sinjorino?

Sinjorino—Ne, sed la virino en ĝi portis abeluočapelon, ornamata per rozeruĝa rubando, kaj ŝia aŭtomobilosako estis malkarafela.

BUY BOOKS WITH A **COUPON TICKET**

You get \$5.50 in coupons for \$5.00, or \$11.00 for \$10.00. The saving in money is good, but the saving of time is better. Quick and convenient—if you want three books, worth \$1.65, you just cut off \$1.65 in coupons, and mail them with your order. If, as sometimes happens, the 35-cent book is out of print—back comes a 35-cent string of coupons and the transaction is closed. No waiting at the post office window for a money order!

Convenient? That's where we get even—it's so convenient that it makes ordering books a positive pleasure.

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.
WEST NEWTON, MASS.

Amerika Esperantisto

American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at
West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

Published Monthly by

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)

WEST NEWTON, MASS.

ONE DOLLAR A YEAR Eksterlande \$1.25 (Sm. 2.50) SINGLE COPY TEN CENTS

Mallongaj verkoj, tradukojoj kaj novajoj ĉiam preferas akceptitaj. Oni ne resendas neakceptitajn manuskriptojn, se la sendinto ne kune sendis la resendpagon. La Redakcio konservas por si la rajton korekti manuskriptojn latubezone.

Oni donos la preferon al manuskriptoj skribitaj skribmaſine.

Vol. 14

JANUARY, 1914

No. 6



EL LA REDAKCIA SANKTEJO



Kun dankeco ni adiaŭis la malnovan jaron, kaj je koroj premataj de espero ni bonvenas la junan. Se dum ĉi tiu periodo de 1914 ni povas duobligi la rezultatojn de 1913, je ĝia fino ree ni havos kaŭzon por dankeco. Dum 1913 okazis kelkaj gravaj aferoj en nia movado, kiujn ni elcerpas por dua ekrigardo: Je la Kolegio de la Kristanaj Fratoj, Esperanto estas enmetita kiel regula lingva studado; ankaŭ en la Universitato de Pittsburg, en la Sudlanda Seminario; en la lernejoj de Pickford, Mich., kaj en la John Marshall (nokte) Altlernejo; La Pittsburgh Akademio de Scienco kaj Arto starigis esperantan fakon; en la tagjurnaloj el preskaŭ ĉiu urbo, granda kaj malgranda, aperis artikoloj pri la internacia lingvo, kaj multaj gravaj gazetoj reklamis la aferon sammaniere. Ci tiuj elcerpajoj nure citas nian progresadon laŭ speciala vojo, sed per multaj signoj ni eltrovas ke nia laboro en la jaro pasinta ne estas vana kaj kun renovigita entuziasmo ni komencas la bataladon por la internacia lingvo en edukadaj rondoj. Esperanto jam frapas je la pordo de la lernejoj kaj postulas sian propran lokon sur la instrua plano. Cu vi permesos ke ĝi restu ekstere?

Je ĉi tiu oportuna tempo, ni ankaŭ deziras atentigi niajn legantojn al la nacia asocio, kiu laboras tiel senlace kaj senĉese unuigi la labo-rantojn esperantistajn en Usono kaj fari organizitan movadon por antaŭenpuŝi la aferon. La Asocio nun sin trovas sur firma bazo, kaj laŭ aneco kaj laŭ financoj, kaj dank' al la penadoj de la oficistoj kaj multaj volontuloj, ĉiu el kiuj laboras senpage por ĝia kreskado, ĝi nun faras pli bonan laboron ol iam antaŭe. Sed ankoraŭ restas kelkaj ekstere kaj estas al vi, eksteruloj, ke ni demandas: Kial devus Francujo kaj aliaj pli malgrandaj, havi 10,000 anojn en sia nacia asocio kaj Usono kvindekoble pli granda, ne duonon de tiu nombro! Se vi vere estas Esperantisto, via devo al la mondesperanta movado, **unue** estas aneco en via nacia asocio.

LETERO EL EÜROPO de nia Privat-a Korespondanto

Nobelpremioj al du esperantistoj Kiam al D-ro Zamenhof?

JAM lastan jaron ricevis la Nobelan premion por paco nia german-aŭstria samideano kaj konata pacifisto **Alfred Fried** pro liaj rimarkindaj servoj al propaca movado per verkoj kaj vigla propagandado ĉefe inter gazetistoj.

Ci-tiun jaron jus ricevis la sāman premion alia esperantisto S-ro Henri Lafontaine, Belga Senatano kaj Prezidanto de la internacia Komitato de l' pacoficejo en Bern.

Nian lingvon S-ro Lafontaine ofte uzas mem en sia Internacia Bibliografia Oficejo en Bruselo por korespondadi kun multaj Fremdaj societoj ĉefe hinaj kaj japanaj.

La Nobelan premion pri medicina scienco jus ricevis nia eminenta francia samideano Profesoro **Charles Richet**, famkonata fiziologisto kaj sincera pacifisto. Por Esperanto li jus publikigis tre gravan artikolon en la Revuo **"La Paix par le Droit"** (Paco per Juro) kaj faris solenan paroladon malfermantante ēe Pariza Universitata Cambrego la festan disdonadon de l' premioj al lernantoj de la Pariza Esperantista Grupo.

Al tiuj eminentaj esperantistoj ni ĉiu sendas tre koran gratulon, esprimante nian ĝojon ke inter niaj rangoj troviĝas tiaj homoj, kiuj faris grandajn servojn al la homaro, nun glore rekonitajn. Ni ne timu

rimarkigi al la publiko, ke ili estas fervoraj adeptoj de nia lingvo kaj ni profitu la okazon montri kiom multaj el la plej noblaj personoj de la homaro estas kun ni.

Tiaj konstatoj efektive impresas certan parton de la publiko pli profunde ol logikaj argumentoj. Post tiu sincera tutkora gratulo kaj tiu ekkapo de bona propagandilo, ni ne povas ne ripeti nian internan demandon : Kiam Zamenhof?

Cu la Nobela komitato ne baldaŭ decidos fine rekoni la grandan meriton de la aŭtoro de Esperanto dediĉante al li proksiman jaron la premion pri paco? Ni esperas, ke ĉiu niaj kompetentaj samideanoj, kiuj rajtas fari proponojn al tiu komitato, t. e. ĉiulandaj parlamentanoj, akademianoj kaj Nobelaj premiitoj vigle klopodos por tio dum la nova jaro. Ili montru al tiu komitato en kiom miloj da koroj enblovis Esperanto la fervoron por paco, en kiom miloj da okazoj ĝi jam estis kaŭzo de internaciaj amikiĝoj kaj interhelpoj, en kiom miloj da ĉiulandaj lokoj ĝi semis potencajn radikojn por la granda familia rondo de tutmonda frateco kaj kunlaborado.

Gis nun ebле atendis la Nobela Komitato, ĉar ĝi ne volis rekompenci servojn nur estonte grandutilajn al homaro kaj ĝi deziris nur konsideri evidentajn faktojn. Nu la tempo jam venis.

De multaj jaroj la lingvo de D-ro Zamenhof vivas kaj proksimigas ĉiutage pli kaj pli milojn da homoj ĉiulandaj. Venis la taŭga horo por rekoni antaŭ tuta homaro la senlacan mirindan laboron de l' modesta geniulo. La Nobelan Premion nepre meritas nia majstro. Ni fidas ke la respondaj personoj ne plu longe atendos por honori samtempe lin kaj sin per tiu tre aplaŭdota gesto.

Franco-germanaj rilatoj kaj Esperantismo

URE ĝusta antaŭsimbolo de la nunvintraj publikaj priokupoj estis la nobla franco-germana manifestacio dum nia IXa kongreso de Esperanto en Bern. Efektive unuarange staras ĉi tiun vintron inter gravaj publikaj demandoj la temo pri la plibonigo de l'rilatoj inter Francujo kaj Germanujo. Rapide disvastiĝis tiu tendenco dum la lastaj monatoj kaj sur ambaŭ flankoj de la landlimo kreigas fortaj movadoj por tiu celo. Kiam kunvenis en Bern lastan printempon francaj kaj germanaj parlamentanoj invititaj de svisaj kolegoj por ĝentila diskutado, estis tie cento da francaj deputatoj kaj nur trideko da germanaj Reichstag-anoj kaj tial en Parizo kelkaj jurnalisi-

toj tuj ekkriis: "Vidu! bonvolemo troviĝas nur ĉe nia flanko k. t. p., k. t. p." Sed nun jus anonciĝis fondo de germana parlamenta grupo por helpi al amikiĝo kun Francujo kaj aliĝis granda nombro da parlamentanoj el preskaŭ ĉiuj politikaj partioj. La semo jetita en Bern produktis tre bonajn fruktojn kaj evidenta bonvolo montriĝas ambaŭ-flanke. Nepre venkos iam tiu paciga tendenco ne nur ĉar tion postulas idealo en la koroj de popolanoj ambaŭraciaj sed ankaŭ ĉar en la du landoj la plejmulto estas terure laca pri la neelportebla pezo de l' novaj militaj ŝargegoj. En ambaŭ landoj la novajn legojn por pligrandigi la armeojn voĉdonis la parlamentoj impresitaj de l' troa forteco de l' najbaro kaj incititaj de tiam tre ĝeneralaj timoj pri baldaŭa milito.

Nun ĉe l' komenco de nia vintra sezono ambaŭ samaj parlamentoj sin subite turnis kontraŭ la registaroj, kiuj kaŭzis tiajn voĉdonojn.

Dum la sama semajno okaze de iaj flankaj demandoj en Berlino la parlamento voĉdonis malaprobon al la kanceliero kaj en Parizo ĝi faligis la registaron. Nu, en mia lasta artikolo mi jus diris al vi, ke en Francujo neniam tre eternaj estas la registaroj. Kelkajn tagojn post kiam mi forsendis miajn paperfoliojn al estimata redaktora moŝto la franca registro subite falis kaj S-ro Prezidanto Poincare devis elekti novan, kiu eble estos iom pli favora al Esperanto, se ĝi havos tempon sin okupi pri tiaj "bagateloj."

Kompreneble la voĉdonitaj militaj leĝoj estas nepre faktiĝintaj kaj oni ne povas ilin tuj nuligi, sed oni tre bone sentas ke tian super-pezan ŝargon la du popoloj ne toleros tre longe. Diversaj societoj kaj revuoj fondiĝis ambaŭflanke por interfratiĝo. Sensaciaj verkoj aperis pri la temo. Eĉ ekster Francujo kaj Germanujo tian klopodon helpas bonvolaj homoj.

La Belgoj kaj Svisoj interalia tre deziras la pacon inter la du grandaj najbaroj, kies eventuala interbatalado riskas ruini iliajn landetojn lokitajn "inter ambaŭ fajradoj." Ankaŭ multaj Britoj deziras tiun repaciĝon kaj efektive se Britujo, Francujo kaj Germanujo povas definitive amikiĝi, tio garantias nepran pacon al granda parto de l' tutmondo. Tian deziresprimon pri la tri nacioj jam faris Mirabeau antaŭ cent dudek jaroj.

La ĉefa malfacilajo en tia nobla klopoado estas la grava demando pri Elzaco-Lotringo, tiu bela Rejna provinco, kiun Germanujo prenis de Francujo post sia venko en 1871. En tiu tempo la loĝantoj laŭte protestis kontraŭ tiu ŝango de nacieco kaj deklaris per siaj deputatoj sian nepran volon resti Francoj.

Post kvardek jaroj nun vivas en Elzaco-Lotringo tute alia generacio, jam la filoj, eĉ la nepoj de 1871-aj homoj. Multaj hodiaŭaj junuloj tie eĉ tute ne komprenas la senton de siaj avoj kaj ne deziras re-

fariĝi Francoj. Ceteraj kontraŭe konservas en sia familio tre viglan memoron pri l' antaŭa patrujo kaj estas nepre "francemaj." Pri tio la popolo estas dividita, sed pri unu afero ĝi estas tute unuigita, ke nepre ĝi abomenas denovan militon. Tion unuanime deklaris ĝia provinca kongreso.

Samtempe ili ankaŭ tute malkaše deklaris sian malkontenton pri sia nuna situacio. Ambaŭ "francema" kaj "nefrancema" partioj konsentas en sia plendado kontraŭ tro severa kaj maldolĉa regado de Prusujo. Ne ĉiu deziras, ke la lando refariĝu franca provinco, sed ĉiu protestas kontraŭ ĝia germanigo kaj laŭte petas sendependan administracion. Ili minimume deziras, ke Elzaco-Lotringo estu same kiel la nordaj urboj Lubeck, Hamburg, Bremen, sendependa respubliko aliginta al Germana Imperia Federacio.

Tiu ĉi afero povas ŝajni unuavide nur Germana demando, kiun neniel koncernas Francojn aŭ ceterajn alilandulojn. Tamen oni devas kompreni ke nenia venko aŭ lego povas detrui la koran kvazaŭ patrinan amon de Francujo al sia perdita provinco. Senĉese venas Parizo famaj Elzacanoj por peti helpon kaj simption, kiun neniu volas rifuzi al ili. Ankaŭ la tutan homaron interesas la demando pro tio, ke ĝi estas kvazaŭ brulanta vundo eterne minacanta la tutmondan trankvilecon per dangero de plej terura militego. Estas do tre kompreneble, ke ĉie oni deziras, ke tiu demando iel kontentige solviĝu. Tial estas tre ĝojige konstati ke anstataŭ konsideri denovan militon kiel solan rimedon por ĝin solvi, oni nun iom post iom pli interesigas je **pacaj** solvoj.

Diversajn rimedojn proponis aŭtoroj de jusaj gravaj verkoj. Kelkaj proponis ke Francujo faru kun Germanujo komercan interŝanĝon kaj fordonu gravan kolonion kiel Madagaskar aŭ Indo-Afriujon por ricevi Elzacon-Lotringon. Ankaŭ oni proponis ke Germanujo mem donu neŭtralan sendependecon aŭ memregecon al la Rejna provinco kaj tiam Francujo montrus sian dankemon malfermantante sian riĉan bankaron al germanaj valoroj. Necese estus, ke Francujo promesu, ke ĝi estos kontenta, kiam la Elzacanoj estos kontentaj, kaj tiel montru sian neegoistan vidpunkton.

Nu, certe estas ke ne ĉi-tiu vintron ekdiskutos tiun demandon la diplomatoj en Berlino kaj Parizo; sed tre ĝojige estas, ke la publiko komencas ĝin konsideri kaj ŝajnas preta por baldaŭ postuli ke la registaroj trouu kontentigan solvon. De tro longe la du grandaj nacioj vivadas en reciproka malfido, de tro longe la plendoj de l' Elzacanoj akrigas tiun situacion. "Ni fine aranĝu la aferon kaj pace vivu!" Jen la interna penso ĉe multaj homoj ambaŭflanke. Oni esperu ke iliaj klopoj baldaŭ fariĝos pli ĝeneralaj kaj sukcesaj. Intertempe, ni,

esperantistoj, povas iel helpi al tiu celo uzante nian lingvon por doni okazojn al Francoj kaj Germanoj interrilatiĝi ĉiam pli ofte kaj pli amike por krei tiun simpatian publikan atmosferon, sen kiu internaciaj diskutoj povas fariĝi tiel danĝeraj.

Antaŭ kelkaj tagoj mi interparolis kun franca samideano, malnova oficiro politika tre konservativa. Li diris al mi kiom li bedaŭris, ke iu Esperanta gazeto povis moki kaj plendi pri la franco-germana manifestacio en Bern. "Ni devus kontraŭe ĝozi ĉiujn, kiam Esperanto donas al ni okazon esti ĝentilaj al niaj orientaj najbaroj," li diris. "Jen eminenta germana samideano leviĝas kaj diras sian ĝojon kunesti sur sama estrado kun franca generalo. Li profitas la okazon por diri belan saluton al nia lando kaj laŭdi nian arton kaj noblecon. Nu, ĉu vi dezirus, ke la franca generalo silente sidu kun ĝenata mieno aŭ diskrete foriru kiel malĝentilulo? Li faris nur sian devon de ĝentila viro leviĝante kaj afable respondante al la Germano. Prave li memorigis pri nia bela gastigo en Dresdeno, prave li invitis la Germanojn alveni multnombre al la Deka Kongreso en Parizo. Prave li frate premis la manon de l' Germano. Tio ne signifas ke li approbas la prenon de Elzaco-Lotringo, tio ne signifas ke li ne konservas doloran ĉagrenon pri la malvenko de 1871. Al fido li respondis per fido kaj li rajtas eĉ esperi ke se multaj Germanoj noble pensas kiel tiu amiko, baldaŭ venos la tago, kiam oni pli facile povos interkon-senti, detru la kaŭzojn de malfido, kaj forgesi ĉiun pasintan malamon."

"Kiam mi estis juna leŭtenanto dum la milito en 1870," daŭrigis mia kunparolanto, "mi iam renkontis post batalo kelkajn germanajn oficirojn kaj tute amike interparolis kun ili pri kolego mia, kiu studis kun unu el ili. Treege ili ĝojis aŭdi de mi, ke li ne mortigis en la batalo. Kial mi ne estus parolinta kun tiuj junaj viroj? Same kiel mi ili faris sian devon, same servis sian patrujon. Vidu kiamaniere nia prezidanto S-ro Poincare jus montris grandan afablecon al germana oficiro vundita per aŭtomobilo en suda Francujo. Vidu kiel niaj francaj oficiroj ĝentile agis al siaj germanaj kolegoj venintaj en aeroplanoj eĉ kontraŭleĝe. Vidu kiel la germana parlamento jus esprimis sian indignon kontraŭ malprudenta junulo, kiu negentile parolis pri Francujo. Cie oni klopodas montri ĝentilecon kaj agi per nobla kaj honorplena maniero por plibonigi la rilatojn inter niaj du nacioj, kaj jen, ni, esperantistoj, plej bone armitaj por tio per nia lingvo, devus montriĝi malafablaj, malĝentilaj, malpacemaj kaj pli rojalistaj ol la reĝo. Feliĉe nur kelkaj tiel malsaghe rezonadas kaj sendube la plejmulto en Germanujo kaj Francujo same kiel mi ĝoje legis pri tiu memorinda manpremo per Esperanto inter honorata Franca Generalo kaj eminenta Germano."

Tiel parolis al mi la brava militisto, kiu apartenas al politika partio tute ŝovinista. Tiu sincera deziro al lojala afableco kaj amikiĝo kun estintaj kontraŭuloj sur internacia batalkampo estas unu el la plej belaj efikoj de esperantismo en multaj koroj kaj unu el ĝiaj plej satindaj allogiloj por noblaj homoj.

Edmond Privat.

WORLD GLEANINGS

AUSTRALIA. In Queensland, the National Council of Women recently held a great demonstration and parade in which more than two thousand children took part, dressed in national costumes. Among them were thirty little girls representing Esperanto,—an excellent advertisement before an audience of ten thousand persons.

BRAZIL. The "Instituto Polyglotico," Rio de Janeiro, has placed Esperanto in its program as part of the regular course of study.

JAPAN. From the quaint little Japanese journal, "Orienta Azio" we learn that S-ro K. Ossaka, secretary of the Jokoska Esperanto Society conducts 13 classes of beginners, devoting his entire time from morning until night to the work. It would be unreasonable to suppose that the Japanese could learn the language in one or two months as Europeans and Americans are able to do, but we are informed the students can more or less easily **read** Esperanto after a few months study.

MEXICO. The turbulent political times in Mexico at present are apparently in no wise affecting the enthusiasm and activity of the Esperantists in that unhappy country. "Meksika Stelo" has again appeared, and from it we are informed that the Mexican samideanoj, small in numbers but full of ardor, have taken up active propaganda work, and are planning to organize a Federation for the whole country.

FRANCE. The early activity and enthusiasm of the French Esperantists promises well for the coming Congress. The "aligiloj" have been distributed by the organizing committee, and for the benefit of American esperantists will be printed in an early issue of A. E. It is hoped that even those who are not fortunate enough to make the trip to Paris, will become congress members, thereby assuring the hard-working committee of your interest and cooperation, and giving them some financial backbone to sustain their labors. All Americans

who are planning definitely to go, or who are as yet "only thinking about it" are requested to apprise A. E. of the fact at the earliest opportunity.

ITALY. In Genoa, at Esperanto examinations held in the barracks, seven soldiers having studied Esperanto only 10 days, easily conversed with foreign samideanoj in the international language.

At the 14th International Congress against Alcoholism held in Milan, Esperanto was accepted as one of the official languages.

HUNGARY. This stronghold of Esperantism has lately been disturbed by a little volcano which made itself felt throughout Europe, and did not cease its rumblings until the shores of America had been reached. In Szekesfehervar where the Esperantists wished to hold a large propaganda meeting, the chief of police forbade the meeting, saying that Esperanto "is a language of thieves," and its study would not be tolerated! As European Esperanto magazines have given the matter publicity, as well as non-Esperantist dailies and journals, we are told the ignorant chief has been fairly swamped with letters and postcards from all over Europe, some mocking him, some instructing him, and some simply recommending that as Esperanto is a language of thieves, he should learn it! Americans who wish to aid in the enlightening process are requested to write to "Urbpolicestro Saghy, Szekesfehervar, Hungary," if their typewriters will stand the strain.

KRONIKO NORDAMERIKA

KROTONA, CALIF. Ci tiu urbeto, apud Los Angeles, havas kreskantan teozofian rondon kaj jus malfermis kurson por komencantoj ĉe kiu troviĝas 20 membroj. S-ro A. P. Warrington, ĝenerala sekretario de la Amerikana Teozofia Societo, kaj S-ro Parrish el Los Angeles, mallonge paroladis.

PICKFORD, MICH. La Estraro de Lernejoj de ĉi tiu lokometis la studon de Esperanto en la kurson altlernejan. S-ro Paul M. Schuyler, EANA estro de Edukado, meritas la krediton por la ago. Ni esperas ke samideanoj aliloke komunikos kun S-ro Schuyler kaj komencos similajn aktivecojn en siaj propraj urboj. Por plenumi tian laboron estis nomata S-ro Schuyler, kaj li deziras helpon de la aktiva Esperantistaro.

La loka jurnaloo "Pickford Clarion," ĉiusemajne, presis bonan ar-

tikolon pri la movado, ktp, kaj multe reklamis nian aferon.

PITTSBURGH, PENNA. Decembron 11an, en parolada ĉambro de la Instituto de Carnegie, sub aŭspicoj de la Esperanta Fako de la Akademio de Scienco & Arto de Pittsburgh, Sro. J. D. Hailman faris bonegan paroladon per helpo de lumbildoj kiujn oni kolektis el diversaj partoj de la mondo speciale por tiu okazo. En tiu parolado Sro. Hailman prezentis la faktojn pri la disvastiĝo de Esperanto kaj pri ĝia jama uzado en komerco, scienco, muziko, ktp kaj montris bildojn de ĉiuj Esperantistaj kongresoj.

La Pittsburghaj Esperantistoj nun posedas bonegan kolekton da lumbildaj pozitivoj pri la diversaj fakoj de la movado prunteblaj senpage al iu societo kiu deziras prezenti ilustritan paroladon pri Esperanto. Por fari aranĝojn, oni sin turnu al Sro. J. M. Clifford, Jr., 741 Braddock Avenue, Braddock, Pa.

Ciulunde la Pittsburgh Sun, grava ĉiutagaĵo-jurnalo, presigas longan artikolon de Winifred Sackville Stoner sub la rubriko WHAT ESPERANTO IS DOING.

PHILADELPHIA, PA. La loka Esperanta societo transmovigis al nova loko, ĉambroj de la Teozofia Societo, kaj oni multe festigis la okazon. Multaj vizitantaj samideanoj ĉeestis, inter ili, kvar bonkonataj instruistinoj el Harrisburg, kaj S-roj Aleksandro kaj Vincent Scucky el Ekaterinoslav, Rusujo. Ĉi tiuj sinjoroj ne parolas angle, kaj la scivolemuloj estis bone konvinkitaj ke la Esperanto parolata en Usono ĝuste sonas la samon kiel Esperanto parolata en aliaj landoj. La regulajn monatajn kunvenojn oni kondukas la kvaran vendredon en ĉiu monato kaj kore bonvenas alvenantojn al Philadelphia. La nova kurso jus malfermita kovros ĉiun flankon de Esperanta aktiveco uzatan de studentoj, kaj du stipendioj estos donataj al tiuj kiuj obtenas la plej altajn gradojn.

COLORADO SPRINGS, COLO. Ciudimanĉe, la "Colorado Springs Gazette" grava tagjurnalisto de ĉi tiu urbo, presas interesan artikolon pri nia movado skribitan de S-ro F. H. Loud, pionira Esperantisto. S-ro Loud tradukas elcerpajojn de A. E., ktp., kaj faras bonan propagandon per interesa kaj efektiva maniero.

Ciudimanĉe klaso el la "First Congregational Church" kunvenas por la studado de la nova Testamento. Oni uzas tiun libron samtempe kun la angla eldono. D-ro Loud estas la gvidanto.

ATLANTA, GA. Kun ĝojo, ni ricevis de fervora Esperantisto, Dr. Cecil H. Stockard, la novajojn ke li nun instruas klason de dek lernantoj, kiu kunvenas ĉiusemajne. Ankaŭ li sciigas nin ke longa artikolo aperis en loka tagjurnalisto pri la klaso. Ĉar antaŭe dum longa

tempo, D-ro Stockard laboris sole por la afero, ni gratulas lin ke li nune komencas gajni sukceson.

MONTPELIER, VT. Okaze de la jara kunveno de la Washington County Esperanto Society, oni elektis kiel oficistaron: Prez. S-ino Nellie M. Gill; Vic-Prez. H. L. Burnett; Kasisto, Robert Frost; sekretario, John L. Stanyan. S-ro Mason S. Stone, estro de la publikaj lernejoj de la ŝtato, kaj D-ro C. H. Fessenden, sekretario de la EANA, estis elektataj honoraj membroj. Kiel apartajo de la societo estas fondita "Interurba Klubo Esperantista" kiu ĉiujare kunvenas, kaj kies anaro konsistas el gesamideanoj en Barre kaj Montpelier.

BOSTON, MASS. Ĉe la kunveno de la Bostonia Societo, Novembro la 18an, Pastro Horace Dutton, el Auburndale, mallonge paroladis pri siaj spertoj en Eŭropo kaj Afriko dum la pasinta somero. La aŭdantaro tre interesigis kaj multe ĝuis la vivantan rakonton.

S-ro Wm. B. James gvidas lertan klason ĉiumarde en ĉambro de la Publika Biblioteko kaj faras el bona materialo sukcesajn kaj entuziasmajn esperantistojn.

PERTH AMBOY, N. J. S-ro H. W. Fisher, Prezidanto de la EANA, dum libertempa vojaĝo tra la sudlando multe propagandadis nian aferon. Li faris paroladon en la lernejo ĉe McClellanville (S. C.), antaŭ granda aŭdantaro, kaj multe interesigis ilin. En Charlestown (S. C.) raportisto gajnis intervjuron kun li kaj artikolo longa unu kolonon estas enmetita en la "Charlestown News & Courier." Nia prezidanto foriris por libertempo, sed kredeble li certe ne ĉesis siajn esperantajn laborojn.

LEMMON, SO. DAK. Ĉi tiu urbo enhavas entuziasman grupon instruatan de S-ro Clinton L. Williams. Oni esperas gajni multajn novajn anojn dum la vintro.

CINCINNATI, OHIO. La Redaktoro de loka tagjurnalo, "The Post" en redaktorajo antaŭ nelonge, montris la plej ridindan nesciadon pri la subjekto de internacia lingvo. Pro la tuja aktiveco de fervora samideano, S-ro Jos. E. Siegel, ekzempleroj de la artikolo kun letero estas senditaj al bonkonataj Esperantistoj tra Usono, kaj la nescianta redaktoro baldaŭ eltrovis ke ekzistas internacia lingvo kaj forta nacia asocio. Car elĉerpajo el la letero de la ĝenerala sekretario estas presita, multaj informoj rezultis, kaj oni esperas havi entuziasman grupan filion de la EANA ĉi tie.

FORT WAYNE, IND. En Septembro estis organizata la Fort Wayne Esperanto Societo, filio de la nacia asocio. La oficistoj estas D-ino L. Allen DeVilbiss, prez.; S-ino Mario Jungton, Vic-prez.; S-ro A. Zidek, sek., kaj S-ro I. O'Campo, kas. La kotizoj por la

societo estas aneco en EANA kaj UEA. La angla grupo da 24 anoj kunvenas ĉiujaude en la publika lernejo. Ciusabate, vespere, je la manĝeo de la Kristana Asocio de Junaj Virinoj, tablo estas rezervita por la Esperantistoj. Tie oni kunvenas kaj interbabiladas. La Societo kreskiĝas kaj plinombriĝas, kaj esperas fari multon por "nja afero."

RICHMOND, VA. Ce la John Marshall Altlernejo (nokte) oni instruas la internacian lingvon al granda klaso de komencantoj. Fino Alice Spiers estas la instruistino. La "Virginian" grava tagjurnalo presis la artikolon de S-ro D. E. Parrish aperintan en la Oktobra A. E.

SUR NIA TABLO

Mi jus evitis gravan danĝeron! Iu iom kolereta sinjoro plendas al mia ĉefredaktoro pri mia recenzo de iu gazeto kiu pli plaĉas al li, ol al mi, kaj la dirita sinjoro kulpigis amikon mian, dirante ke li rekonas la stilon de mia amiko. Por ke mi ne estu malkovrita, eble forrabata kaj turmentata de iu el miaj kritikotoj, estas necese ke mi maskovestu mian stilon. Mi do intencas, de nun, imiti la stilojn de niaj eminentuloj por ke mia personeco ne estu korekte divenata. Eble, tion farante, mi atingos la deziratan internaciecon, tiamaniere, laŭ angla diro, "mortiginte du birdojn per unu ŝtono."

UNIVERSO. La plej bele presita gazeto inter la recenzota amaso. De ĝia trikolora kovrilo, ĝis ĝiaj belegaj klišajoj, ĝi estas taŭga konkuranto al iu ajn altpreza eldonajo, ie sur la mondo farita. Gia enhavo ne malsuperas ĝian eksteran kaj internan ŝajnojn. La ok-dek paĝoj enhavitas prezuntas diversecon da materialo, kiu tenas la daŭran atenton de la leganto. La ĉesa artikolo estas lerta traduko de la tragedio "Judith" de Freidrich Hebbel, esperantigita de Prof-ro D-ro Siegfried Lederer. Sekvas priskribo de la muzeo de l' skribo en Leipzig, bele ilustrita. Poste, geografia artikolo pri Stirio, kun deknaŭ klišajoj, kiuj de arta kaj pejzaĝa vidpunktoj, estas malofte egalitaj. Alia artikolo priskribas la arton galvanoplastikan, ankaŭ bele ilustrita. Rilate Universo, ĝi estas juvelo; belaj paĝoj ĝiaj ne povas ne allogi ciun leganton.

MEKSIIKA STELO. Reaperas tiu gazeto, post dormado. Ni gratulas al la redakcio, kaj al la sindonaj samideanoj, ĉar meze de la tra la lando irantaj maltrankvilajoj, ili ankoraŭ restas fidelaj al Esperanto, kaj ni esperu ke la semo de toleremo kaj paco, kia estas la vera

Esperantismo, enradikiĝu en la koroj de la nacianoj, kaj post ne longe malkonsentoj kaj bataladoj ĉesu. Car la gazeto estas preskaŭ tute en la hispana lingvo, ne estas eble recenzi ĝian enhavon.

POSTA ESPERANTISTO. Oficiala organo de Esperantistaj Poštoficistoj ("Ildepo"). Tre grava faka gazeto, celanta disvastigon de konado pri Esperanto inter la plej universa, kaj plej grava fako de la surteraj registaroj. Gi povos multe plenumi rilate la oficialan al-prenon de Esperanto, kiel universala helplingvo. La recenzata numero enhavas interesplenan aldonon ilustritan pri la fabrikado de skribplumo, kaj pritraktante la evoluadon de la skribplumo, de ĝia antikva antaŭulo, ĝis la nuntempa perfektajo.

GREKLINGVA ESPERANTISTO. Kvinqarulo, oficiala organo de la Samosa Esperanto Societo. En la du ricevitaj numeroj oni klarigas pri la malkompreno rilate la oficialan uzadon de Esperanto sur tiu insulo. Vere la Samosaj samideanoj estas fervoraj kaj agemaj, kaj estas sendube ke pro tiu fervoreco, aldone al inteligenta agado, la afero ne suferos inter la Grekoj. Oni ankaŭ anoncas la eldonon de Grek-Esperanta Vortaro, de nia senlaca samideano, Dro. Stamatiadis. Ni ankau estas ricevintaj ekzempleron de tiu libro, kiu estos recenzata en alia fako de nia gazeto.

LA SVABA ESPERANTISTO. Okpaĝa jurnaleto duonmonata, ankoraŭ suĉinfano sed beleta kaj sanplena bubeto. La ricevita numero enhavas bonegan raporton de la "Agado de la Virtemberga Esperanto-Instituto" kiu dum ĝia finita unua jaro disdonis tra la tuta mondo centmilojn da propagandaj presajoj. La jurnaleto estas tre leginda kaj estas ornamita de kelkaj kliŝajoj.

FUNDAMENTO. Kiam mi legis la titolon de tiu gazeto, mi diris al mi, "Nur atendu dum mi diissiru ĝin!", tamen, kiam kritikaj miaj tra la paĝoj serĉantaj okuloj vagadas, mi ne povas ne aprobi la celon de la gazeto, ĝi estas ĝian esperantan stilon, ĝui ĝian enhavon, kaj bonveni ĝin en la surtablan amason. Verŝajne, la komerca flanko de la afero estas bone antaŭripensita, kaj la redakcio prezentas al legontoj allogan programon. Kun ĝi mi konsentas ke ankoraŭ restas kampo por bonégaj pluaj esperantaj eldonajoj. Fundamento estu tia!

Tamen, mi kredas ke la nomo elektita estas iom neoportuna. Eble ne estas prave ke oni altrudu al la redakcio plendon pri aroganteo, sed, almenaŭ estas domaĝe ke ĝi estas nomo, kiu al la tuta esperantistaro estas kvazaŭe sankta, ankaŭ ĝi emos produkti konfuzon. Se estas dezirinde ke la ideo de fundamenteco estu konservita, ĉu ne estas pli dece se oni uzu ĝin adjektive kaj nomu la novan ambiciulon "Fundamenta Revuo"?

Inter interesplenaj enhavoj estas persona rememoro de la Redaktoro, Sro. Devyatnin, pri sia esperantistiigo. La humoroj ne estas tute limigitaj al sia propra fako, ĉar inter la anoncetoj ni trovas la jenan, (kiu almenau estos amuziga al usonaj legantoj) "30 jara noblulo (grafo) volas transdoni sian titolon per geedziigo. Aĝo, karaktero kaj eksterajo de la estonta edzino estas indiferentaj,—devas esti nur bona doto." Malgraŭ la honesta malkaſemo de la anoncinto, mi bedaŭras ke tia reklamo sin trovas en gazeto, havanta tiel puran kaj ambician titolon.

Pluaj ekzempleroj de jam recenzitaj eminentuloj, elmontras la fakton ke ĉie oni ankoraŭ laboras ageme por nia afero, ke la tutmonda esperantistaro estas vigla. Estas domaĝe ke, ĉiu laboranto ne povas almenau eklegi nian ĉiam kreskantan, kaj ĉiam pliboniĝantan literaturn periodan. Tia legado estas ja kuraĝigilo. Ni nepre venkos,—jes, ni estas venkantaj!

Ko Fo.

FUMADO

Jam en lito ĉiuj kuſas,
Lacaj de la taglaboro,
Kaj en la kvieta horo
Al la komfortega fajro
Mi la apogsegon puſas.

Poste mi la pipon trovas
Kaj solide ĝin plenigas,
Gin tre zorge ekbruligas
Kaj sidigas, krurojn krucas,
Dum la fumon mi elblovas.

Al plafono cirkulanta,
Fuma nubo tuj sin levas,
Dum mi vivkontente revas
Pri nenio speciala
Nek estinta nek estanta.

Bagatela ŝajnas ĉio
De ĉagreno en vivado
Tiun horon je fumado
Ce la komfortega fajro
Dum mi pensas pri—nenio.
J. Lekberg.

TAGJURNALO EN SES LINGVOJ

Malesperinte en siaj klopoj eldoni tagjurnalon kiu plenumos la postulojn de ĉiuj siaj abonantoj, kiuj estas plejparte ŝtafabrikistoj, la eldonisto de Slovaka tagjurnalo en Gary, Ind., Usono, jam komencis presi sian journalon en itala, bohema, kroata, pola, hungara kaj angla lingvoj ĉiutage. Nun liaj serbaj kaj rusaj abonantoj ekpostulas "siajn-rajtojn."

—Tradukita el *The Linotype Bulletin*.

LA VAGISTO

GAJA, ridetanta, feliĉa vagisto li estis, kvankam ĉiam senmona, senamika, sendoma. Sencele li ĉirkaŭvagadis la landon, tagon post tago, monaton post monato, serĉante nenion krom kvietan lokon kie li povos kuŝi kaj dormi kiam la nokto venis, iom da nutraĵo kiam la malsato pikis lian stomakon. Same kiel migra birdo li norden turnis siajn pašojn en la printempo kiam floroj kaj la herbo komencis kreski, suden kiam la aŭtunaj tagoj komencis mallongigi kaj la noktoj malvarmiĝi.

La mondo por li estis mirinda loko, mondo, ĉiel laŭdinda kaj ĉiam aminda. Kelkfoje li haltis en la vojo kie li promenadis kaj enpensiĝis, kompatante tiujn estajojn kiuj devas loĝi en aliaj mondoj, ĉar iam oni diris al li ke troviĝas aliaj mondoj similantaj nian, kies enloĝantoj sendube similas nin, kaj tion li firme kredis, eĉ kiel li kredis kion oni diris al li.

Ke neniam li povis tintigi monerojn en siaj poŝoj; ke ĉiam liaj vestajoj estis malnovaj kaj ĉifonaj; ke iam lia stomako doloris pro manko de nutraĵo—cio ĉi tio neniam maltrankviligis lin. Nuraj bagateloj estis tiaj mankoj. La bonaj ajoj de la vivo tiel multe superis la malbonajn ke li tute ne povis trovi ian kaŭzon por plendi kontraŭ io ajn. Se iu homo iam vere posedis la "stonon de la filozofo," tiu vagisto estis tia: li havis ĉion ajn kion li deziris.

Dum li vagadis ĉi tien kaj tien, laŭlonge de la kamparaj vojoj, inter verdaj grenkampoj, flanke de bruantaj riveretoj, preter ĉarmaj farmbienoj, kaj tra belaj vilaĝoj, la vorto de kanto estis preskaŭ ĉiam sur liaj lipoj. Gi estis lia propra kanto: li mem ĝin verkis kaj li sole ĝin kantis. Gi enhavis dudeku versajojn, unu por ĉiu jaro de la tempo dum kiu li estis vagadinta. Jen la unua:

"La vojo por mi!
La vojo por mi!
La mondo estas bela, mia vivo ja ĉielo!
La vojo, la vojo por mi!"

La vojo neniam perdis al li sian ĉarmon kaj sian misteron. Vagi antaŭen kaj antaŭen, sencele, senzorge, ĉiam mirante kio atendas tie post tiu monteto, aŭ tie kie la vojo kurbiĝas—jen ĉiama plezuro.

"Cu eble mi ne trovos tie malgrandan blankan dometon starantan en florĝardeno el kiu alpašos al mi bonvizaĝa virino kun telero da mangajoj en la mano, dirante, 'Bonvenu, vagisto! Cu vi ne estas malsata? Sidiĝu kaj manĝu!' Aŭ eble sovaĝa hundo renkontos min, tie

post la monteto, entuziasme montrante al mi la dentojn! Bone eĉ tiaokaze ĉar tiam mi ĉirkaŭos tra la kampo, kaj eble mi trovos pomarbon plenan je malacidaj pomoj!" Tiel li ofte parolis en si mem dum li vagadis antaŭen.

Nenio, neniu maltrankvilis la vagiston. Legojn li neniam rompis, homojn li neniam ofendis. Se la de li vizititaj kamparanoj volis doni al li mangi, kaj permesis al li dormi en iliaj ĉevalejoj, bone ja; se ne, bone ankaŭ. Iuokaze li restis tute kontenta, kaj ĉiam la mondo estis bonega loko.

Sed unu foje la sorto ludis kruele kun la vagisto. Si mokis lin, frenzeziĝis. Strange estas ke la sorto tiel kaprice iafoge agas kontraŭ homoj.

Okazis ke en certa vilaĝo kiu troviĝis en tiu parto de la lando kie tiam vojaĝis la vagisto, kelkaj friponoj—vagistoj tute malsimilaj je tiu kiun ni priskribas—rompis la legojn kaj insultis kaj ofendis la vilaĝanojn. Ili ŝtelis kokojn, fruktojn, kaj legomojn; ili eniris drinkejon, ekkaptis kaj trinkis kelkajn bareletojn da biero, kaj poste provis bruligi la vilaĝon. Amase la vilaĝanoj elpelis la aŭlojn for de la vilaĝo, kaj tiam fervore faris juron ke iu vagisto kiu iam eniros tiun vilaĝon tuj estos permesata ĝui la komforton de la malliberejo ĝis la jugisto disponos lin.

Tiun saman vesperon, je la horo kiam la suno estis subiranta sub la okidentaj montetoj kaj la krepusko estis moliganta la tutan mondron, nia vagisto eniris tiun vilaĝon, kantante gaje—

"La vojo por mi!
La vojo por mi!
La mondo estas bela, mia vivo ja ĉiela!
La vojo, la vojo por mi!"

Rapide alpaſis al la kantanto viro kiu portis sur la brusto stanan stelon. Senvorte li ekkaptis la surprizitan envenanton, ĉirkaŭligis liajn du manojn per ŝtala ĉeno, kaj ankoraŭ senvorte kondukis lin al la malliberejo, malgranda ŝtona konstruaĵo kun baritaj fenestroj.

Plena je miro, konsterno kaj timo la kompatinda vagisto apenaŭ povis paroli. "Mi faris nenion! Mi faris nenion!" li balbutis foje kaj ree. Sed la policano respondis nenian vorton.

Tiun nokton la vagisto kuſis sur la malvarmaj ŝtonoj de la mallibereja ĉambreto, mizera kaj malfeliĉa. Li estis vundita en la spirito; li suferis doloron en la koro. Ke li, pacamanta viro, viro kiu amas la tutan mondron, viro kiu neniam agis malbone kontraŭ iu— ke li estu malliberita! "Maljusto! Maljusto!" li ekkriis en la mallumo, kaj pli ol unu fojon tiun nokton, la larmoj malsekigis liajn vangojn.

La morgaŭan matenon li estis kondukata al la vilaĝa jugisto. Tiu sinjoro, pompa kaj memcerta ostkapulo, rigardis la arrestiton je

severaj okuloj.

"Vagistaĉo," li diris, "vi alvenis al la malĝusta vilaĝo. Gi ne estas bona loko por via sano. Mi intencas doni al vi tian bonegan memorigilon ke poste vi neniam forgesos ĉi tiun urbeton. Mi intencas sendi vin al la ŝtonamaso kie vi povos rompi la ŝtonojn dum tridek tagoj. Tiel la leĝrompisto metamorfoziĝas je ŝtonrompisto. Ha, ha, ha! Bonega sercajo, ĉu ne, Toni?" Li palpebrumis bonhumore al la policano.

"Sed mi faris nenion kontraŭleĝe, via moŝto! Mi—" La vagisto ne finis paroli.

"Silentu!" tondris la juĝisto. "Oficiro, prenu lin al la ŝtonamaso kaj donu al li la plej grandan martelon haveblan, kaj zorgu ke li rompu ŝtonojn dek horojn ĉiutage."

"Lasu tion al mi, via moŝto," diris la policano, ridetante kaj grimacante.

Mi hontas diri kiel kruele, kiel senkompare tiuj vilaĝaj sovaĝuloj laborigis tiun senkulpan vagiston. Ciumatene li estis kondukata al ŝtonamaso. Ci tie dum dek horoj li svingigis pezan martelon, rompante la malmolajn ŝtonojn. Nokte li dormis en malseketa, malvarmeta ĉambreto, kušante sur lito el granito. Kaj la nutrajo kiun oni donis al li estis nutrajo por porkoj, al li kiu ĉiam estis manginta la plej bonajn mangajojn de la lando!

La gaja rideto malaperis for de liaj lipoj; liaj vangoj paliĝis; lia dorso kurbigis; grandaj vezikoj aperis sur liaj manoj; lia koro mal-moliĝis; kaj li komencis senti la malamon, la malamegon, li kiu ĉiam sentis la amvarmecon en la koro! Li komencis pripensi pri venĝo. "Ili pagos! Ili pagos!" li nun ofte diris en si mem, kaj dum li laboris aŭ dum li kušís en la malliberejo li pripensadis la venĝon kiun li faros.

Pasis dekkvin tagoj. Tiam komencis pluvi kaj dum unu tuta semajno la pluvo ne cessis fali. Dum tiu semajno la malliberigito ĝuis iom da ripozo ĉar lia gardisto ne ŝatis starri en la falanta pluvo, kaj permesis lin resti en la malliberejo. Nun li pripensis nenion krom la venĝo.

Ie li estis trovinta pecon da ŝtalo, kaj dum la pluvaj tagoj li okupis sin je la fabrikado de segilo. Li ne estis mallerta je tia arto kaj li bone sukcesis en sia laboro. Tuj li komencis segi unu el la ŝtalaj bariloj kiuji baris la fenestrojn de la malliberejo.

Unu nokton, iom post la meza horo, li elgrimpis el sia ĉambreto tra la segitaj bariloj, saltis al la tero, kaj senbrue elstelis el la vilaĝo. Ankoraŭ la pluvo falis kaj li aŭdis la bruegon de la superplena rivero kiu fluis tra la valeto en kiu sidis la vilaĝo.

Kiam li estis preterpasinta la lastan domon li haltis kaj malantaŭen rigardis. Tie en la mallumo dormis preskaŭ mil homoj. Kiel

li malamegis ilin ĉiujn! Ili estis malliberigintaj lin; ili estis punintaj lin maljuste; ili estis mokintaj lin! Venĝon, venĝon li deziris kaj li havos ĝin! Sed kiel okazigi ĝin? Post longa pensado li skuis la kapon kaj antaŭeniris. Li ne kuragiĝis resti proksime de la vilaĝo. La deziro por venĝo estis granda sed la timo de tiu ŝtonamaso estis pli granda.

Li sekvis la vojon laŭlonge de la rivero. Du kilometrojn for de la vilaĝo li alvenis al artefarita lago. Alta kaj larĝa digo entenis en granda kavo la kolektitan akvaron de la ĉirkauantaj montetoj. Li jam iome sciis pri tiu lago kaj ĝia entenanta digo. Antaŭ du aŭ tri tagoj li aŭdis du virojn parolantajn pri la dangero kiu minacas la vilagon okaze de difektigo de la digo. La longa falado de la pluovo estis superpleniginta la lagon, kaj dube estis ĉu la digo povus subteni pli grandan premadon.

La vagisto scivole suprengrimpis al la supraĵo de la digo kaj promenadis laŭlonge de ĝi. Li rimarkis kiel la ondetoj de la lago tuisis la suprajn randojn de la barilo. Decidante ke tia promenadejo estis tro dangera dum malluma nokto, li estis ekforironta kiam la sono de falanta kaj murmuranta akvaro frapis liajn orelojn. Li ne povis kompreni tion. Malrapide li antaŭenpaſis al la loko kie la sono estis plej laŭta. Ha! Jen trueto en la digo! Trueto tra kiu la akvo estis fluetanta, kaj kiu estis pligrandiĝanta je ĉiu momento!

La graveco de lia eltrovo ne tuj tuisis lin, kaj li rigardis la falantan akvon seninterese. Subite li komencis ridi. "Ha, ha, ha! Jen mia venĝo! La diablo estu kun mi! Jen mi nur devas atendi kaj mia venĝo estos plenigata. Bonege ja! Mi certe atendos! Morgaŭmatene tiu kondamninda vilaĝo kaj ĝiaj enloĝantoj kiuj maljuste punis min—kie ĝi kaj ili estos? Nenie! Cio estos pereinta!" Tiel li parolis tie en la mallumo.

Li sidigis apud la digo, kontente aŭskultante al la murmurado de la akvo fluetanta tra la kreveto en la ligmuro. Grade la sono plilaŭtiĝis ĉar la truo estis plilarĝiĝanta. En apuda sendanĝera loko, komforte klinante sin sur arbtrunko, la vagisto restis, ridetante kaj grimacante, trankvile atendante la tutan rompiĝon de la digo. Tiam, li bone sciis, muro da akvo trakuregos tra la valeton, detruante ĉion en sia vojo.

Image li povis vidi tiujn virojn kiuj estis mokintaj lin, baraktantaj en la sovaĝaj ondoj; image li povis aŭdi iliajn mortkriojn, kaj tia imagado tre placis al li. Sed—pri la virinoj kaj la malgrandaj infanoj! Ha! Tiuj ankaŭ? Ili ne faris al li ian malbonon. Mortigi virinojn kaj infanojn senkulpajn? Ne, ne, ne! La penso terurigis kaj tremigis lin. "Neniam!" li ekkriis. "Mi savos ilin!"

Li suprensaltis kaj rapidis al la digo. Furioze li komencis labori, provante haltigi la elfluon de la akvo, sed li laboris vane! li ne povis fermi la krevon. Per la manoj li enjetis teron en la truon, sed tuj la akvo forportis ĝin. Li freneziĝis, li ekkriis, li ploris, li preĝis. Liaj manoj sangokovriĝis, la svito elstaris en gutoj sur la brovo, li tute eluzis siajn fortojn.

Fine malesperante, li jetis sian tutan korpon en la larĝigantan krevon, sidiĝis en ĝi, kaj komencis premi la teron ĉirkaŭ sia korpo. Iome li haltigis la alfluon. Li daŭris altiri la teron al li kaj meti ĝin ĉirkaŭ siaj flankoj, ne ĉesante ĝis kiam la truo estis efektive ŝtopita.

Tie li sidis, duonenterigite, la reston de tiu nokto. Li estis malvarmega kaj malsekega; bone li scis ke li pereos se la digo rompiĝos, sed li restis tie, zorge gardante ke neniu nova trueto aperu.

Frumatene la viro kies devo estis observi la digon ĉiuore dumnokte, vekiĝis el longa, dolca dormado, alvenis por rigardi la lagon, kaj trovis la vagiston. Terurfrapite li rapidegis al la vilaĝo kaj sciigis ĉion al la vilaĝanoj. Baldaŭ venis kurante amaso da viroj portantaj ŝovelilojn kaj pikilojn. Rapide ili riparis kaj plifortigis la difektitan digon, kaj tiam liberigis la heroon kiu estis savinta ilin ĉiujn. Zorge ili alportis lin al la vilaĝo kie la tuta vilaĝanaro elkuris por renkonti kaj honorigi sian savinton. Sed la heroo sciis nenion pri tio. Li estis, se ne jam morta, mortonta—tiel diris la doktoro.

Sed li ne mortis. Dum tiu tuta tago li dolce dormadis en bonega lito, kaj iam posttagmeze li vekiĝis, streĉis sin, oscedis, kaj petis mangajojn.

Kia gojo en tiu vilaĝo! Gia savinto vivos! Grandajn preparojn oni tuj komencigis por dece honorigi lin. La urbdomo estis malfermita kaj beligita per floroj kaj flagoj. Ciuj vilaĝanoj ĉesis labori kaj pripensis nenion krom la honorfesto. Neniam antaŭe estis tiu vilaĝo tiel ekscitita.

Post bonega vespermanĝo kiun oni servis al li en lia ĉambro, la vagisto estis kondukata al ĉambreto en la urbdomo, de du stilkonstantaj kaj elegantaj junuloj. Al tiuj estis donita la devo laŭmode vestigi la heroon kaj vidindigi lin por la festo. Ili senvestigis lin je liaj ĉifonajoj; ili banigis lin longtempe; ili razigis lin kaj tranĉigis al li la hararon. Tiam ili donis al li tute novan vestajaron. Ili devigis lin engrimpi en senpošan pantolonon; ili surmetis sur liajn piedojn patentledajn duonšuojn; ili puŝis lian kapon en blankegan, multamelumitan ĉemizon; ĉirkaŭ lia kolo ili ĉirkaŭigis altan, raspantan kolumnon, kaj al tiu ili ligis belan, blankan kravaton. Ĉirkaŭ lin nun ili butonumis ĉarman, florornamitan subveston, kaj sur tiun, longvostan frakon ili

metis; tiam ili oleigis lian hararon kaj kombis ĝin ĝis li petis kompaton.

Pli da korpa mizero la vagisto neniam estis suferinta. Malĝoje li sopiris, memorante la komforton de siaj ĉifonajoj. Li bedaŭris ke iam li forlasis la malliberejon; li bedaŭris ke li ne estis pereinta ĉe la digo. Li minacis la du elegantulojn, sed ili konsolis lin, promesante ke baldaŭ li ŝuos la surprizon de sia vivo.

Dume en la aŭdantarejo de la urbdomo estis kolektiĝanta la tuta vilaĝanaro. Tien ili venis, ĉiu babilante kaj ridante, por honorigi sian savinton. Super la estrado ŝvebis granda standardo sur kiu estis skribita en nigraj literoj—"Nia Heroo—Nia Savinto!" Ĉiu viro, ĉiu virino, ĉiu infano de la vilaĝo ĉeestis. La gardisto kiu estis gardinta la vagiston, la policano kiu estis arestinta lin, la ostkapa juĝisto kiu estis juginta lin—tiuj tri estis la ĉefuloj de la okazo, ĉar ĉu ili ne persone konas la heroon?

Fine kiam la aŭdantarejo estis plenigita la juĝisto supreniris la estradon por regi la kunvenon. Pri sia oratora kapableco li estis tre fiera, kaj nun, kiel ĉefulo de ĉi tiu gravega afero, li intencis montrigi siajn povojn. Post muziko de la brazobando kaj kanto de la horo, li komencis oratori. Li parolis pri la historio kaj la gloro de la vilaĝo, pri la vilaĝanoj, pri si mem—ĉefe pri tiu temo—pri la senmorteco de la animo—fakte pri ĉiu temo sub la suno. Li paroladis, li paroladis, kaj ankoraŭ li paroladis. Liaj aŭskultantoj maltrankviligis. Virinoj nervumiĝis, infanoj ploris, viroj malbenis. Ili venis tien por honorigi sian heroon, ne aŭskulti al ostkapa oratoro! Sed daŭre la memkontenta juĝisto paroladis.

La du monduoj, atendante en la apuda ĉambro kune kun la heroo, malpacieniĝis kaj forlasis sian zorgoton por eniri la aŭdantarejon kaj ellerni kiel oni tiel longe atendigis ilin. Ili trovis la juĝiston ĉielenantan en sia sencesa oratoraolo.

Je la foriro de siaj gardistoj la mizera, svitanta, suferanta vagisto ĉirkaŭrigardis espereme. En anguleto de la ĉambro li vidis siajn ĉifonajojn. Li eksaltis pieden. Aŭdiĝis la sono de rompigo de butonoj, la svingbruo de forjetitaj vestajoj, kaj la vilaĝa savinto staris ĉe la fenestro, preskaŭ nuda sed kun pakajo da ĉifonajoj sub la brako. El la fenestro kiel hundo tra truo en kokejo, li eksaltis, kaj tra la aleoj kiel leporo ĉasata, li kuregis.

"Savita! Savita!" li murmuris en si mem kiam, en la ombrajo de arbego, li haltis por vesti sin, kaj "Savita!" li daŭris subparoli kiam li estis fininta sian vestadon kaj estis antaŭeniranta laŭlonge de la vojo.

Jam de kelkaj horoj la pluvo ĉesis fali. La junia aero estis freŝa, pura, kaj dolĉa. Foje kaj ree li gustumis ĝin kaj aprobe lekis siajn

lipojn. Li aŭdis la pepadon de birdoj kaj birdidoj en la arbboxo super li; la sono de bojado de farmhundo frapis liajn orelojn; mil steloj tremesis kaj brilis en la sennuba ĉielo; la tero sub liaj piedoj estis mola kaj risortema. Li estis feliĉa; granda ĝojo regis lian koron; rideto ĉirkaŭludis ĉirkaŭ liaj lipoj, kaj mallauĝe li komencis kanti:

"La vojo por mi!
La vojo por mi!
La mondo estas bela, mia vivo ja ĉielo!
La vojo, la vojo por mi!"

Esto.

LA ŜIPO DE STATO

BELEGE la fiera ŝipo flosis ĉe la doko, atendante ordonojn por marvojaĝi. La ŝipestro demandis: "Cu ĉio estas preta?" Oni respondis: "Jes, jes, Sinjoro!"

Sed subite multego da virinoj aperis sur la doko kaj ekkriis: "Pro la bonsano kaj la savo de la ŝipo, kaj pro justeco al ni, kunprenu nin sur ŝipen."

La ŝipestro respondis: "Estas ne kutime havi virinojn sur tiu ĉi ŝipo. Gi manipuliĝas de nur viroj, ĉar virinoj ne estas kapablaj administraci ŝipaferojn."

"Sed," respondis la virinoj, "antaŭe iam virinoj tion faris, kiel la reginoj Esther, Elizabeth kaj Victoria. Krome, ni ne deziras regi, sed nur kunlabori kun la viroj, disdonante al ĉiu persono laŭ sia propra kapableco. La Sipo de Stato apartenas al ĉiu, kaj devas esti kondukata de ĉiuj el ĝiaj posedantoj; certe ĝi estas ne vira ŝipo, sed homa."

La ŝipestro konsilis kun la ceteraj oficiroj kaj fine, post multe da diskuto, ili konsentis permesi la virinojn en ŝipigii.

Goje la virinoj alvenis, edzinoj, patrinoj, fratinoj kaj amantinoj, kaj la Sipo de Stato ekmarvojaĝis pli fiera ol iam, ĉar ĝi nun portas homamason (ne sole viramason).

Kaj rigardu la frukton de la ŝango! La virinoj ne penis fari aferojn ekster sia kapableco, sed komencis rektigi malbonajojn. Ili trovis, kion oni longatempe estis suspektanta, ke multaj malriĉaj virinoj jam estas sur la ŝipo servantaj kiel ĉiaj sklavinoj, morale kaj mone, tial ke ricevantaj tro malmulte da pago. Ankaŭ sin trovis granda maljusteco al la maristoj. Tiujn ĉi aferojn la virinoj rapide

korektis, kaj feliĉo plene regis.

Post multaj plezuraj tagoj surſipe, tamen, subita granda ekkrio estis aŭdata: "Malamika ŝipo alvenas. Jen! Jen! Kion ni devus fari pro la virinoj?"

La virinoj mem kviete respondis: "Trankviliĝu. Ni decidos tiun ĉi militon." La viroj surprize ekrigardis dum la virinoj suprenlevis grandan blankan tukon kiel pacflagon kaj atendis la alproksimiĝantan ŝipon. Kiam la malamika ŝipo alvenis sufice proksima por klare vidi, oni miregis je la ĉeesto de virinoj kaj infanoj.

"Kion signifas tio?" ili ekkriis. La virinoj signis ke la malamikoj venu surſipen. Tiam konsilo fariĝis, kaj la edzino de la ŝipestro paroladis jene: "Viroj malamikaj, ĉu vi volas mortigi viajn kunvirojn? Mortigante ilin, vi ankaŭ donos al ni, virinoj kaj infanoj, staton pli malbonan ol morto. Cu vi ne scias ke ĉiu homoj estas gefratoj kaj havas Unu Patron?"

La malamikoj multe hontis kaj konfesis sian kulpon. Tiam invititaj, ili ekzamenis la noblan Ŝipon de Ŝtato kaj trovis ĉion bonega. Kun granda plezuro ili akceptis proponitajn refrešajojn, kaj foriris, dirante: "Ni ankaŭ tuj ricevos niajn virinojn sur nian ŝipon kaj proklamas tutmondan gefratecon."

Jas. L. Smiley

NE EÜGENIKA

Susanjo (sesjara)—Kaj kiam ni estas plenaĝaj ni edziĝos, ĉu ne, Robcjo?"

Robcjo (malĝoje)—Ne, Susanjo. Mi ne povas edziĝi en vian familion. Via paĉjo havas malfortajn okulojn kaj via onklino havas kunvulsiojn."

"Jes," li diris, "viro ne lernas tion kio estas la feliĉeco ĝis li estas edziĝinta."

"Mi ĝojas ke vi fine estas eltrovinta tion," respondis ŝi kun vidajo de tuja propono.

"Jes," li diris, "kaj kiam li estas edziĝinta, estas tro malfrue."

—Brooklyn Citizen.

"Mia fianĉo estas financisto."

"Kiel vi scias?"

"Li ne aĉetis la fianĉringon ĝis mi akceptis lin."

NELLA

aŭ

La Vojo Nekonata

Originala Novelo de Edmond Privat

Capitro V

Dum multaj tagoj kaj semajnoj firme tenis sian mempromeson la malfeliĉa Nella, kiu devis superhome bataladi kontraŭ sia brulanta dezirego revidi la karulon amatan.

Siaflanke Paŭlo Kermas spertis la kruelajn horojn de soleca vagado ĉirkaŭ la domo de l' amatino, la frenezan atendadon eĉ foje dum nokto sur la strato, la vanecon de siaj elokventaj amleteroj, la tormentadon de dubo kaj nescio. Ciutage li sonoris ĉe l' pordo de Nella kaj ĉiutage li aŭdis de l' flegistino tiun ĉiam saman rimarkon: "Fino Passor iom progresis al sano hodiaŭ sed ankoraŭ ne povas ricevi vizitojn." Nella ja kredis, ke pli facile per leteroj ŝi povos iom post iom lin konvinki per dolĉa ĉiutage pli klara aludado al necesa disiĝo. Prave ŝi timis, ke ĉe lia vido tutu ŝia volo elfandiĝus. Kaj tamen ŝi sentis, ke la sistemo estas kruela. Siaj leteretoj ne konvinkis Paŭlon kaj lin nur suferigis. Ciumatene la poštisto portis al ŝi novan lian amplestan petegan leteron, en kiu li anoncas sian viziton.

Por ne tro mirigi la flegistonon ŝi devis rifuzi ankaŭ aliajn vizitojn sed ŝi bone konsciis, ke tio ne povos daŭri. Jam de longe la kuracisto permesis, ke ŝi levigu, kaj nun ŝi povis eĉ formeti la bandagon. Akre suferigis ŝin tiu necesa krueleco al Paŭlo, kies senlaca insistado enjetis en ŝian koron dolcan, tre dolcan venenon kontraŭ ŝia volo. Ciumatene legante liajn leterojn ŝi momente forgesis ĉion kaj jam volus esti en liaj brakoj, ĝui lian amatan ĉeeston, liajn kisojn, lian amon, sed jen ankaŭ ŝi prezentis al si kiel estus vivo posta, kiel jalusa ŝi fariĝus. kiel suspektema, kiel senĉese preta malkovri ĉe li kompaton eĉ eble tuj lacecon anstataŭ amo forsveninta. Si prezentis al si scenojn de intervidiĝo, kun furiozaj kisadoj, amjuroj, ebriigoj de koro, kaj poste ploroj, bedaŭroj, vanaj adiaŭoj kaj denovaj cedojoj, denovaj kisadoj, kaj ankoraŭ ploroj, tormentado. Jam eĉ per imago tio atakis ŝian nervaron kaj donis al ŝi abomenan moralan naŭzon. Tial ŝi respondis per denovaj petoj, ke li ne plu provu veni . . . "Mi ne volas, ke vi eĉ ekvidu min difektita de l' akcidento, se vi ne sukcesos min tuj forgesi, mi volas almenaŭ ke vi memoru vian Nellan, tia, kian vi ŝin amis. Ne disrompu mian malfeliĉan animon, ne trudu al mi la honton de tia

revidigo! Vi devus min kompreni . . .”

Sed vane ŝi skribis, ĉar Paŭlo tro fidis sian amon, tro fidis sian forton por akcepti eternan disigon. Li ja komprenis tre bone, ke se ili nepre devus disigi profunde kruele estus revidi ŝin kaj poste ŝin forlasi por tuta vivo, ĉar tio estus ja vera forlaso malnobla. Sed tian malgajan ideon li ne volis akcepti. Li volis vivi por ŝi kaj krei al ŝi per amo dorlotema spite ĉio plezurigan ekziston.

Li do decidis, ke li nepre ŝin vidos kaj konvinkos forjeti la nigrajn intencojn kaj akcepti la promesitan edziniĝon.

Jam multe pli longe ol necese Nella konservis apud si la sindonan flegistinon, ĉar ŝi tre timis malgajegan solecon. Alvenis tempo, kiam ŝi verè ne estis plu malsanulino, sed nur—ho ve—kriplulino. Unu ŝia okulo preskaŭ ne vidis plu kaj ŝia tutaj vizaĝo estis en nepriskribbebla stato. La flegistinon ŝi ne povis plu reteni kaj iun tagon ŝin ekanstataŭis ĉe la pordo helpvirino, al kiu ŝi faris saman rekondon pri vizitantoj.

Paŭlo havis la ŝancon alveni tiun tagon ĉe malsama horo ol kutime kaj la malsuspektima virino, kiu ĝis nun neniam vidis D-ron Baüer, kredis, ke tiu silenta kaj senĝena sinjoro estas la kuracisto. Ŝi lin enirigis en la saloneton kaj anoncis al Nella la alvenon de “la Doktoro.”

Efektive jam de longe ne venis la D-ro Baüer, tial, kvankam Nella ne atendis lin tiun tagon, lia subita vizito ne ŝajnis tro stranga. Tamen antaŭ ol trapasi la iom malfermitan pordon de l' salono, ŝi rigardis la grandan spugulon sur la kameno kaj renkontis sur la brilanta vitro—la rigardon de Paŭlo. Glacie ŝin haltigis sur la sojlo per nevidetla fera mano la kontraŭaj tentoj sin jeti en liajn brakojn aŭ forkuri por ŝin kaŝi. En fajrera sekundo ŝi havis tempon ekвидi el la okuloj de Paŭlo abomenon, kompaton kaj subite honton, sed jam li kvazaŭ fulmotondro levigis, malfermis la pordon al la koridoro kaj foriris pafrapidege.

(Daŭrigota)

Kial viro kiu havas novan edzinon similas viiron kiu aĉetis malpacemajn katojn?

Car li ricevas grat-ul-ojn.

Briggs—Mi vidas ke la statoj en Sing Sing estas tre malbonaj.

Griggs—Jes. Mi opinias per la sciigajoj ke ili estas preskaŭ tiel malbonaj kiel la somerhoteloj kie mi pasigis mian libertempion.



BOOK REVIEWS

One or two letters have been received taking exceptions to the criticisms in the November book-reviews of the on-its-head-standing sentence. However, since many times that number of favorable comments have been made on the same criticism, the writer has been allowed to continue the work of this department during good behavior.

Several instances were cited of languages where this reversed order is sometimes found,—possibly frequently enough to mark it as an approved literary style. This is no argument for internationality. There are found in our great body of esperantists people of all hues and shades of complexion but we should not consider it necessary in our congresses for the light skinned persons to stain their faces and the dark skinned ones to powder theirs in order to make the thing truly international.

To your reviewer one of the beauties of Esperanto literature is the preservation in *translations* of enough of the style of the original language to make them distinctive. We shall speak of this later when we review that most interesting collection to be found in the Orienta Almanako. Many original works also contain a certain piquant flavor of nationality,—and we like this too, but,—when an English author, in an original work, goes out of his way to produce such ridiculous combinations of words as were cited in our criticism it seems to the writer,—who is one of the old fashioned Esperantists, brought up on the Krestomatio and the writings of our earlier eminentuloj,—that it is time to look the matter squarely in the face. Such form of expression is far from international and is as much of an acquired taste as a fondness for Camembert cheese and half cooked putrid game,—i. e. to any but one of the few nations in which such inversion is common.

It is very true that Dr. Zamenhof is frequently quoted as giving perfect freedom so far as word order is concerned but doesn't this mean that one need not violate his sense of fitness from the view-point of his own language? In fact, doesn't he urge that the natural style of the speaker or author be used?

Language is the expression of thought and except in poetry its expression is in the logical order of thought. Why should it be distorted? Is there any free born American citizen who would think "there goes the urchin with the shortened of his father pants"? Why say it that way? There are some of us who like startling things and others of us who put a fictitious value on articles which come from Europe. Let us hope that like the Tango and the Hobble Skirt the acrobatic sentence will have its day and that we may once more return to the ways of our fathers, so far as simplicity in literary style is concerned.

KURSA LERNOLIBRO, by Edmond Privat, 18 cents.

This little book is carefully and neatly printed, free from grave press errors and is issued at a popular price.

It is an excellent text-book for a mixed class where it is desirable to get a quick working knowledge of Esperanto. As it contains practically no grammar it is absolutely essential that it should be used under a teacher who is perfectly familiar with the entire Esperanto grammar. It is totally unfit for home study for beginners or for use in a class meeting for mutual study.

The fact that it was written by Privat is a guarantee that its Esperanto is of the best style and as a whole it can be safely used as a model of elegant Esperanto. Those of us who are perfectly familiar with Privat's style are aware that he has a tendency toward the acrobatic sentence. While an unusual order of words may be effective and acceptable in the hands of a master its imitation by the inexperienced Esperantist (and we have seen many samples of this form of construction) is about as graceful as the antics of a cow, compared with the graceful frisking of a kitten. The logical order of words will always be understood and until you have complete mastery of the language, don't attempt to juggle with it!

Many of the examples in the book are designed to show the superiority of Esperanto in exact expression of the idea; for example "Cu tiu sinjoro laboras kun sia filo? Jes, li laboras kun sia filo kaj lia helpo estas tre granda al li." The whole book is filled with just such neatly turned sentences.

While the reviewer is a firm believer in UEA and one of its enthusiastic supporters the dragging in of its mention in a general textbook reminds us of an epitaph said to be found in one of our cemeteries; "Here lies the body of Mary, beloved wife of John Jones who is still conducting a first class grocery at the corner of Main and Cedar Streets."

The graphic chart on page 62, showing the relations of local prepositions is worth the full price of the book, and on page 63 is the best schematic arrangement of correlative words which has ever been published.

THE ESPERANTO TEACHER, by Helen Fryer, 20 cents.

The fact that this book is now in its sixth edition speaks for its well deserved popularity. While it makes the modest claim to be "A simple course for non-grammarians" it contains a sufficiently clear and logical exposition of the simple grammar and syntax of Esperanto to give a thorough foundation in Esperanto which will make further analytical study a pleasure. Its exercises are well chosen and while the "Ekzercaro" is used in part, each lesson contains sentences from

other sources, including many which are easily recognized as having been taken from our best literature.

The reading lessons at the end of the book are well selected from Esperanto classics, old and new, and are admirably adapted to familiarize the student with a variety of styles, all of which are excellent. The book also contains two good vocabularies and is a good complete textbook for home study. There are many little helps to fix important points in the memory. For instance: in lesson 37 on Por and Pro we find the following: "Por looks **forward** to the aim or purpose of the action, to that which comes after the action, while **pro** looks **back** to what came before the action and caused it to be done, as *Mi mangas pro malsato por vivi.*"

OFFICIAL COMMUNICATIONS

Sub ĉi tiu rubriko la redaktoroj volente presigos komunikajojn de ĉiu esperantista societo, kiu havas inter nia legantaro sufice da anoj aŭ kies speciale fako de laboro interesos niajn abonantojn.

**The Esperanto Association of North America
Central Office: Newton Center, Mass.**

THE NEW YEAR

1914 finds us in a condition which should make us all happy. The past year was in many ways a trying one for the Association and now that it is past and gone and we have ended our struggle of reorganization it is a fitting time to take the general membership into our confidence.

Owing to an attempt to continue the publication of the Herald, at a constant loss, we came to our annual meeting in July with a treasury balance of \$5.72 and bills-payable to the amount of \$173.50. An appeal was made to certain individuals through a special finance committee and both individuals and societies responded heartily to the support of a special fund to care for past indebtedness and to form a nucleus of a special propaganda fund.

On January 1, 1914 we are free from debt; all bills incurred are met as they become due and there is to our credit something over a hundred dollars.

Renewals of membership have in the main been prompt and although one important division and several large societies have not

yet sent in their returns our membership is already considerably more than half as large as it was at the end of our active work for last year. Memberships are being received from new sections and there seems to be a general awakening of interest throughout the country. Best of all is a renewed activity of many of our former members who had become indifferent, or lured by some siren voice had wandered away from the fold.

During the year we have had much favorable mention in the newspapers, and malicious attempts upon the part of a well known organization to obtain publication of false statements concerning Esperanto have opened the columns of several important papers to a discussion in which Esperanto has had the last word. We are indebted to such a discussion in the New York Globe for a decided increase of interest in New York City and a considerable accession of membership. An innocent editorial in the Cincinnati Post upon "The curse of Babel," bewailing the lack of an international language, brought a flood of letters to the Editor, who treated us very handsomely in giving a prominent place to the information received as to the existence and rapidly growing universality of Esperanto. This has resulted in a reawakening in Cincinnati and a considerable increase of our membership in that city.

In both these incidents, which are only two out of many, the prompt and satisfactory results were due to team-work on the part of the Association members and this goes to show the value and absolute necessity of organized effort in order to accomplish rapid and great results.

The increased interest on the part of educators is also extremely gratifying. While a number of institutions are teaching or preparing to teach Esperanto, it is not to be expected that it will at once be adopted by **every** school organization. School superintendents are practical men, without sentiment, and they hesitate to burden their teachers with any extra work until such a time as its absolute necessity has been demonstrated. It is for us as an association to show by example the practical educational value of Esperanto. In this we are being admirably helped by our Students Esperanto League and scarcely a week passes that we do not get reports of one or more "rondoj."

Our needs for the coming year are for more workers and more centres of activity. Our success will depend largely upon individual work. Comparatively few of us are fitted for public and wholesale propaganda but every one of us is able to do some personal work and to interest at least one friend in Esperanto.

Our efforts to show the Esperantists that the Association belongs to every one of them and that it is what they as individuals make it are being rewarded by a very general appreciation of personal responsibility and helpful cooperation in our work.

E.A.N.A. and the A.E. Co.

There seems to be a more or less general confusion as to the matter of addresses of the above organizations and mail and remittances sent to the wrong address not only add unnecessarily to the clerical work of each organization but give an added possibility of loss or confusion.

All matters relating to the Association and its work should be sent to the Esperanto Office, Newton Centre, Mass. All matters relating to the Magazine or the book department should be addressed to THE AMERICAN ESPERANTIST CO., WEST NEWTON, MASS. While it may be convenient in some cases to combine correspondence or remittances it is earnestly hoped that so far as possible all communications will be addressed to the respective departments to which they belong.

EKLEZIA ESPERANTISTA LIGO

An important movement has been inaugurated by the Esperantist Clergy of England, toward the formation of this League among members of the Anglican Church and a committee of organization has the matter well under way. Although the limit of eligibility to membership has not yet been definitely established, the present membership embraces not only the Church of England, but also the Protestant Episcopal Church of America. It is hoped that before the February issue of Amerika Esperantisto we shall be provided with a national representative through whom memberships may be received. At the present time they should be sent direct to Rev. Archibald Ashley, Hon. Sec'y, 20, Leyland Rd., Southport, Lancashire, England. Membership fee for 1914 is 25c and should be accompanied by the following information; 1, Full address, 2, Profession, 3, University or College, 4, University degree.

END OF OFFICIAL PART

ANTIKVA

"Via avo estas iom antikva, ĉu ne?"

"Jes, li estas maljunulo. Li povas rememori kiam oni eldonis la Nov Jorkajn vesperjurnalojn posttagmeze." —Judge.

VOJAGO AL LA KANALO

HODIAŬ estas nur unu kanalo en la ideoj de ĉiuj personoj. Estas la Panama-Kanalo! Tiu grandega konstruegajo baldaŭ finiĝos, kaj eĉ nun preskaŭ finigita estas.

La sesan de Septembro en la jaro mil naŭcent dek tri, mi ensciigis en la novan vaporŝipon "Pastores" de la "Unuigita Frukta Kompanio," de Nov-Jorko, por viziti la Kanallandon. La "Pastores" estas nova vaporŝipo granda, bela, rapida, kaj tute agrabla, kaj ni vojaĝantoj ĝuis plezuregan libertempan vojaĝon.

Estis je la unua posttagmeze, sabate, kiam ni mallaŭte eliris el la haveno de Nov-Jorko en la grandan maron, kiu tiom tute glata estis kaj kiu dum tri semajnoj tiel trankvile restis ke preskaŭ neniu havis la marmalsanon.

Post kvin tagoj ni alvenis al Kingston kiu signifas "Reĝurbo," la ĉefurbo de la Brita Kolonio, Jamajko, kiu estas insulo de sama nomo. Tie la ŝipo restis unu tagon kaj duonon, kaj la vojaĝantoj vizitis la urbon kaj aliajn lokojn en la insulo. Kelkaj sinjoroj, inter kiuj troviĝis mi veturis en aŭtomobilo al la antaŭa antikva ĉefurbo, angle nomata "Spanishtown" kiu signifas "Hispana Urbo." Tie ni vizitis la antikvan katedralon, kaj la ne plu uzatajn registarajn domojn.

Tra "Hispana Urbo" ni veturis tra la valo de la rivero Cobre al la vilaĝo de "Bogwalk," kiu signifas "Slima Promenado," de kiu ni revertoris al Kingstono laŭ la valo kaj "Hispana Urbo." Dum la posttagmezo ni vizitis la urbon Kingstonon, piede kaj tramveture, kaj precipite la Esperajn Gardenojn (Hope Gardens), kie oni havis multajn interesajn kaj belegajn kreskadojn tropikajn.

Elirintaj el Kingstono, ni forvojaĝis trans la Maron Karibean, kaj post du noktoj alvenis frumatene al Kolono (Colon), la komerca urbo je la norda ekstremo de la kanalo. Nur frenezulo aŭ mensogulo povas priskribi Kolonon kiel belan, sed estas oportuna kaj kurioza urbeto, kaj ĝia pozicio sur la tropika marbordo estas tre bela.

Ce Kolono restis la vaporŝipo du tagojn kaj duonon dum kiuj la vojaĝantoj havis tempon suficien por viziti Panama-Urbon kaj vidi la ĉefajn vidindajojn de la Kanala Regiono. Oni scias ke la Usona registro antaŭ preskaŭ dek jaroj acetis de la Panama Respubliko la rajton konstrui la kanalon kaj havi eksklusivan aŭtoritaton sur la tero tra kiu la kanalo konstruota estis. Do estas nun du registroj en la Istmo, la respublika registro ekstere de la regiono, en Kolono kaj Panama-Urbo, kaj la usona registro en la Kanala Regiono.

La vojaĝantoj el nia ŝipo traveturis la Istmon per la bone konata Panama-Fervojo el Kolono al Panama-Urbo, vizitis la urbon dum la posttagmezo kaj restis en la hotelo Tivolio dum la nokto. La duan tagon, ni pasigis matene per vizitoj al la kluzo de "Pedro-Miguel" kiu signifas "Petro Mikaelo," sed kiun oni ofte angle nomas "Peter Magill," al la kluzoj de "Miraflores," al la nove konstruota kaj nune konstruata "Balboa" haveno kaj urbo, kaj ankaŭ ni ĉeestis priskribon de la tuta kanalo kune kun la gvidisto kiu kondukis nin. Ni vizitis posttagmeze Kulebron, kaj vespere revenis al Kolono.



KLUZOJ DE GATUNO

Do ni ĝoje vojaĝis denove trans la maron unu nokton kaj alvenis al belega golfo ĉirikia ĉe Almiranto, kaj al la beleta urbeto "Bocas del Toro" kiu signifas "Bušoj de Bovo." Estas komerca stacio de la Frukta Kompanio, kiel ankaŭ la urbeto Almiranto kie la vapor-ŝipo restis dum la posttagmezo kaj kie ni faris fervojan veturadon tra la bananaj plantejoj de la Kompanio tre interesan kaj plezurigan.

Oni povas trovi sufice facile priskribojn de la kanalo aŭ spertajn aŭ ne spertajn. Do ne estas necese ke mi diru pli ol miajn ideojn ĝeneralajn pri la konstruado. La trian matenon mi vizitis la kluzojn de Gatuno, kiu estas la plej grandega kluzaro en la mondo kaj suprenkondukos la ŝipojn de la nivelo de la Maro Karibea okdekkvin futojn per tri gradoj al la nivelo de la artefarita Lago Gatuno post la nekredeble grandega digo, aŭ pli bone, digego, kiu estas, laŭ mia nesperta opinio, la plej mirinda laboro de la tuta afero. Bedaŭrinde oni ne povas vidi pli ol la ruĝan koton en la superajo de la digo.

La vetero en la Istmo ne estas varmega escepte en la rekta sunlumo, sed estas tre fluidajgea precipite en la


El Almiranto dum la nokto ni vojaĝis al Limono, havena urbo en la respubliko Marbordo Riĉa, hispane "Costa Rica." Tie la vojaĝantoj veturnis fervoje al la ĉefurbo de la respubliko, hispane nomata "San Jose" (Sankta Josefo). La veturnado de Limono al "San Jose" estas unu inter la plej vidindaj veturnadoj en la mondo. Oni altiĝas ĝis kvin mil futoj super la maro tra bela, belega, kaj plibeliganta valo ĝis alta terplatajo, riĉa kaj fruktoplena, en kiu estas du urboj, Kartago, kaj "San Jose." La ĉefurbo estas tute hispana en formo kaj ŝajno, kaj preskaŭ en vivo kaj popolo, kvankam estas aliaj elementoj, kiel indiĝenoj, inter la malaltaj klasoj, sed pli multe ol ĝenerale sude de Usono estas tiu lando, blank-homa lando.



"BOG WALK" VILAGO, JAMAJKO

La vetero en la alta parto de Marbordo Riĉa ne estas tiel varmega kiel la malalta apud la maro, kaj facile ni portis niajn surtutojn. Sed la vetero estas tre fluidaja kaj subtenas tropikajn kreskajojn, ĉar ne varmega, ankaŭ neniam estas tre malvarma, sufice por frosto. Do estas la ĉefa produktajo de la terplatajo la kafo, kiu bezonas fluidajan ne tro varman, sed neniam frostan veteron. Oni plantas la kafon kaj la bananon kune miksitajn en la sama tero, por havi la ombron de la grandaj folioj bananaj super la kafo. Kontraŭe la kafo ŝirmas la bananon iomete kontraŭ la vento, kiu estas tre malhelpa al la banano. Pro tiu kaŭzo laŭ mia kompremo, en la malaltaj varmegaj teroj kie la kafo ne kreskas, oni plantas la kakaon inter la bananoj. La kakao havas belegan foliaron kaj la miksaĵo estas tre bela.

El Marbordo Riĉa ni revojaĝis al Kolono, el Kolono al Kingstono denove, kaj tiam en kvar tagoj, pro la rapideco de la ŝipo, al Nov-



SAN JOSE

Jorko,—portante kiel komercan aferon de la Frukta Kompanio, tri-dek mil faskojn da bananoj,—kaj portante kiel plezuran aferon de la vojaĝantoj la memoron de vojaĝo ne komparebla.

Karlo Herberto Cigno.

MATERIO KAJ SPACO

KIAM oni pensas pri la grandece de la suno kaj de la planedoj, kaj speciale kiam oni sciigis ke multaj el la steloj estas pli grandaj ol nia suno, kelkaj eĉ multoble pli grandaj, oni facile forgesis ke kompare al la spaco en kiu ili movis la sunoj de la universo kune kun ĉiuj iliaj akompanantoj estas tute sensignifaj per grandeco.

Estas neeble al la homa animo fari al si ideon pri eĉ negrandaj spacoj kaj distancoj. Oni povas imagi colon, futon, percion; sed tre malmultaj povas akurate bildi al si mejlon, eĉ se ili vojaĝas multajn mejlojn ĉiutage, kaj kiam ni provos imagi naŭdek kvin milionojn da mejloj, la distancon de la suno, aŭ dudek kvin trilionojn da mejloj, la distancon de Alpha Centaŭri, nia plej proksima najbaro inter la steloj,

la animo estas tute senpova. Ni povas nur diri al ni ke tiuj distancoj estas grandaj, treege grandaj, neimageble grandaj, sed tiuj vortoj nur vidigas la malpovecon de la īmago.

Sed kvankam oni ne povas imagi per la animo astronomiajn mezurojn, estas facile kompari tiajn mezurojn unu kun alia, tial ke ni povas desegni bildon sur papero, kiu povas montri la rilatajn proporciojn de iliaj grandecoj, precize kiel oni povas desegni karton geografian de granda lando aŭ kontinento, kiun tamen neniу povus koncepti anime en ĝia tuteco.

Estas vere ke kiam ni komparas la amplekson de la suna sistemo kun la vastega spaco kiu disigas ĝin de la plej proksima stelo, la efektiva desegno sur papero okazas esti nefarebla, pro tio, ke ĝi bezonas tro grandan folion da papero. Spite tion, tamen, la proporcioj povas esti faritaj klaraj al la kompreno.

Ni supozu ke la distanco al Alpha Centaŭri de nia suno estu reprezentata kiel unu mejlo. Tiam ni malgrandigu la grandecon de la suna sistemo je egala proporcio. La diametro de la orbito de Neptuno, la plej ekstera konata planedo, estas ĉirkaŭ 5,400,000,000 da mejloj. Tiu diametro malgrandigita kiel supozita fariĝus—kio? Mejlo? Percio? Jardo? Vi divenas malprave. Gi estus ĉirkaŭ dektri coloj: tio estas, la disesto de la suno kaj Neptuno, kiu kompreneble estas duono de la diametro de la Neptuna orbito, estus ĉirkaŭ 6.6 coloj. La radio de la tera orbito estus unu kvinono da colo.

Nun, kio estus la grandece de la suno sur tiu ĉi skalo? Mi aldonu al la maso de la suno tiun de ĉiuj planedoj kaj iliaj satelitoj; tio pligrandigus la mason de la suno nur je unu sepcent-okdekono (1-780)—pligrandiĝo kiu estus nevidebla. Tiam la diametro de la tuta maso de la materio de la suna sistemo estus unu kvarcent-kvinono (1-450) da colo. Tio estas, la spaco okupita de la tuta materio de la suna sistemo, kompare al la sfera spaco kies radio estas la distanco de Alpha Centaŭri, estas kiel polvero 1-450 da colo je diametro kompare al sfero du mejloj je diametro. Tial ke korpo unu ducentono da colo je diametro estas tute nevidebla por la nehelpata okulo, tia po'vero bezonus grandigan lenson por sin videbligi.

Sed estas 4.189 kubaj mejloj en sfero du mejlojn je diametro. Se do ni supozus ke la materio de la suna sistemo estu uniforme dispeçigita en sfero kies radio estas duono de la distanco de Alpha Centaŭri, po unu peceto en ĉiu kuba mejlo de la sfero, la diametro de tia peceto estus 1-725 da colo tre proksime.

Tiu ĉi kalkuloj estas faritaj laŭ la supozo ke la masoj de ĉiuj membroj de la suna sistemo estu transmetitaj en densecon egalajn je tiu de la tero.

Eble oni akirus eĉ pli bonan ideon de la vasteco de spaco kompare je tiu porcio da ĝi okupita de materio, kiam oni komparas la supreditajn kalkulojn kun la fakto ke la maso de la suno kune kun ĉiu ĝiaj akompanantoj estas ĉirkaŭ 76,275,000,000,000,000 kubaj mejloj, el kiuj nia malgranda tero prenas ne malpli ol 259,000,000,000.

Robert M. Bailey.

"La tempo jam pasis," fiere deklamis oratoro, "kiam viro povas sin kaŝi post virina jupo."

"Ja, jes," rimarkigis cinikulo sur la plej malantaŭa sidejo, "tiuj X-radiaj jupoj ĉesigis tion." —Buffalo Express.

Li—"Estu la mia, kaj vi igos min la plej feliĉa viro en la mondo."

Si—"Mi tre bedaŭras, sed domaĝe, mi mem deziras esti feliĉa."

—Boston Transcript.

"Tiuj ĉinaj literoj estas kuriozaj," diris viro staranta antaŭ lavejo.

"Jes," respondis lia amiko, "ĉina estas la sola lingvo, laŭ mia scio, kiu aspektas precize kiel ĝi sonas." —Washington Star.

Trad. J. M. C., Jr.

You Ought to take SCIENCA GAZETO

A monthly magazine entirely in Esperanto, devoted to Science and Industry.

Contains semi-technical articles on many interesting subjects. Subscribe for your own pleasure—and show each copy to some scientific friend.

*Send Subscription (\$1.50) through
The American Esperantist Co., Inc.
West Newton, Mass.*

(Sample copy, 20 cents)

POLA ESPERANTISTO

Monata gazeto, aperadas okan jaron, ĉiam pliinteresigante sian programon.

En 1913-a jaro "P. E." krom 12 ilustrataj, zorge redaktataj numeroj en klasika, pure fundamenta Esperanto, donos al siaj abonantoj senpagan:

"LITERATURAN ALDONON"

(200 paĝa volumo)

Sendu abonagon (\$1.40) al la American Esperantist Company, West Newton, Mass.

Foreign Magazines

Twelve copies, our selection, back numbers, for only sixty cents

The American Esperantist Co., Inc.
West Newton, Mass.

The American Boy



The **SAFE** boys' magazine
Twelve months of
Only \$1 a year

All boy for all boys, not a child's paper. Clean as a whistle, full of pictures, 32 to 42 pages every month. Manly, inspiring stories of travel, adventure, athletics, history, school life, written by most popular boys' authors. Instructive special articles. Fine articles on football and other sports. Departments of Mechanics, Electricity, Photography, Popular Science, How to Make Things, Stamp Collecting, Chickens, Pets, Gardening, Inventions and Natural Wonders.

THE AMERICAN BOY	
Regular Price, One Year . . .	\$1.00
AMERIKA ESPERANTISTO	
Regular Price, One Year . . .	1.00
Regular Price for both . . .	\$2.00
SPECIAL PRICE FOR BOTH . . .	\$1.70

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., INC.
West Newton, Mass.

Read by 500,000 boys
—and endorsed by their parents

At Last, A Real Footease

Simpson "Higena" Sanitary Innersole
sily placed inside your shoes. Immediately relieves tired, aching feet and chilains. Positively cures callous and keeps our feet warm during the Winter. Trial will convince you. Send size of shoe. Price 25c.
Mailed 30c.

Maker, ALBERT E. SIMPSON,
39 Webster St., Lynn, Mass.

LA IDEALA LIVELO

Unu sola



Hermete

parto

fermita

Elfluado a Vaporigado de l' Alkoholo estas
neebles

Usos Vendeo

EHNISA ENTREPRENO ESPERANTISTA
105 Hawthorne St., Brooklyn, N. Y.

THE WHOLE OF ESPERANTO

EXCELLENT PROPAGANDA MATERIAL ORDER TODAY

5c per copy 10 for 25c 50 for \$1.00

Contains Grammar, Vocabularies and a Little Story. Just the thing
to interest your non-Esperantist friends.

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., INC.,

West Newton, Mass.



"LA UNUA LECONO"

Vivas hodiaŭ multaj avinoj, kiuj antaŭ sesdek jaroj ricevis
sian "unuan lecionon" ĉe

Emerson Piano

kaj tiun pianon ili ankoraŭ plej amas.

Vendistoj en ĉefaj urboj kaj urbetoj.

Petu katalogon.

EMERSON PIANO CO. - - - Boston, Mass.